Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

18-a de julio 2021, numero 8
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## El la Gazetaraj Komunikoj de UEA: Salutletero de Unesko



Speciala momento de la unua tago [de la 2-a VK] estis salutletero de Unesko al la 106-a UK/2-a VK. Ĝi estis ricevita vendredon, la 16-an de julio, de Mirejo Grosjean, kiu laŭ peto de la Estraro de UEA skribis al Unesko por inviti la ĝeneralan direktorinon de Unesko Audrey Azoulay saluti la eventojn. Respondo venis nome de ŝi pere de la vic-ĝenerala direktoro de Unesko, Prof. Tawfik Jelassi, kiu bondeziris kaj parolis pri la eventoj, UEA kaj ILEI en tre pozitivaj frazoj. Prof. Jelassi venas el Tunizio kaj eniris sian oficon en julio 2021. La letero venis en la franca. Originalo troviĝas en la Teko de UEA: uea.org/l/teko/agado. Tradukon faris Mirejo Grosjean:

**De: Sinjoro Tawfik Jelassi, Vic-ĝenerala direktoro de Unesko, respondeculo pri la sektoroj de komunikado kaj informado.**

*Sinjorino prezidanto,*

*Nome de la Ĝenerala Direktorino mi elkore dankas al vi pro via letero, en kiu vi invitas ŝin partopreni en la tutmonda kongreso de Universala Esperanto-Asocio, kiu okazos de la 17-a ĝis la 24-a de julio.*

*Unesko estas dankema al vi pro tiu invito partopreni en tiu grava jara aranĝo de la Esperanto-komunumo. Tiu evento esprimas trafe la viglecon de UEA, ĝi ankaŭ spegulas ties ĵusajn pozitivajn iniciatojn.*

*Unesko estas feliĉa kaj fiera labori flanke de UEA ekde jardekoj por antaŭenigi la kulturan kaj lingvan diversecon, same kiel por antaŭenigi la gravecon de tiu diverseco por konstrui kaj fortigi pacon. La publikigo, danke al vi, de la Unesko-Kuriero en Esperanto, pruvas bone la vastecon de niaj samopiniadoj.*

*Tamen mi bedaŭras, ke mi devas anonci al vi, ke la Ĝenerala Direktorino ne povos partopreni la eldonon de 2021 de la Kongreso pro aliaj devoj de longa tempo jam deciditaj.*

*Mi volas certigi vin, ke Unesko konsideras kun plej alta graveco la laboron faritan de UEA kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kies prezidanto vi estas. Ĉiuj oficejoj de Unesko staras kompreneble je via dispono por plani kun vi novajn formojn de kunlaboro ĉirkaŭ niaj komunaj perspektivoj.*

*Kun ripetitaj dankoj pro via invito, mi petas vin akcepti mian plej altan respekton.*


***Tawfik Jelassi***

Fonto: https://uea.org/gk/965a1

## Belfasta LKK salutis la 2-an VK

Kadre de la Malfermo de la 2-a VK reprezentantoj de LKK de la 106-a Universala Kongreso, kiu devus okazi ĉi-jare en Belfasto, Nord-Irlando, sed bedaŭrinde estis nuligita pro la tutmonda sankrizo, salutis la partoprenantojn.





Tim Owen, la prezidanto de LKK tre dankis UEA pro bona kunlaboro, bedaŭrante, ke ĉi-jare UK ne povas okazi en Nord-Irlando.

Sekvis salutoj de la sekretario de LKK Lorna Flanagan. Ŝi emfazis, ke Belfasto estas tre taŭga urbo por okazigi tiajn eventojn, kiel UK de Esperanto. Tion pruvas pluraj konstante kaj sukcese okazantaj en la urbo diversaj amasaj aranĝoj: festivaloj, festoj, kongresoj... Ŝi anoncis, ke kompence al la nuligita UK-o dum la VK okazos kelkaj programeroj, rilataj al Irlando, Nord-Irlando kaj Britio, kiel, ekzemple, enkonduko al la irlanda lingvo, pri la gaeloj kaj skotoj en Irlando kaj Nord-Irlando, virtuala ekskurso al la ŝipo Titanic ka.


Lorna loĝas en Nord-Irlando, apud Belfasto.

Vi povas respekti iliajn salutojn en la filmeto de la Malfermo. Por tio vi povas uzi serĉilon de la sistemo "Retevent" (https://vk.retevent.com), tajpante "malfermo".

# Vizaĝoj de la Internacia Kongresa Universitato



**IKU / AIS 1**
Amri Wandel



**IKU / AIS 2**
Jesper Lykke Jacobsen



**IKU / AIS 3**
Francesco Maurelli



**IKU / AIS 4**
Orlando E. Raola



**IKU 5**
Michele Gazzola



**IKU 6**
Mikaelo Bronŝtejn



**IKU 7**
Keyhan Sayadpour



**IKU 8**
Gabriel Beecham



**Scienca Kafejo**
Ulrich Brandenburg



**Scienca Kafejo**
Alessandra Madella



**Scienca Kafejo**
Sara Spanò




**Scienca Kafejo**
Anna Striganova

La temojn de la prelegoj vi povas vidi en la 7-a numero de *La Kolombo de Paco*

# Dua tago de la Internacia Kongresa Universitato: Fraktoj kaj Lunvojaĝado





Dimanĉe okazis du IKU-prelegoj: Fraktoj (Jesper Jacobsen) kaj Lunvojaĝado (Francesco Maurelli). Ambaŭ havos ankaŭ duan prelegon (mardon kaj ĵaŭdon, respektive). Kurioze prof. Jacobsen prezentis sian prelegon vive, el sia feriloko, dum fone oni aŭdis la sonojn de la bovinaj sonoriloj.




La IKU-programon oni povas facile superrigardi serĉante la vorton "IKU:" en la plena programo. Dek-minutan video-superrigardon de ĉiuj 12 prelegoj (ok IKU kaj kvar prelegoj de la Scienca Kafejo, okazonta mardon, 12-14h UTC) oni povas spekti en la registraĵo de la IKU-inaŭguro (17.07 14:00 UTC, rekta retligo https://mallonge.net/fl) en la minuto 19:40. Ĉiu el la prelegantoj prezentas sin kaj sian prelegon dum unu minuto.

Por pli ĝui kaj facile sekvi la prelegojn, estas rekomendite anticipe trafoliumi la koncernan tekston en la senpage elŝutebla IKU-libro http://iku2.trovu.com.



# Aŭtora momento: Mikaelo Bronŝtejn

Atinginta nun pli malpli saĝan aĝon,
Mi ne dubas, ke l'subten' amika
Sen avar' provizos la kuraĝon
Vivi plu en ravo romantika.



Mikaelo Bronŝtejn estas konata al la Esperantista loĝantaro de la mondo pro la atentokaptaj turneoj, efektivigitaj en diversaj landoj kaj kontinentoj dum la lastaj 30 jaroj. Liajn porinfanajn librojn volonte konsumas denaskuloj. Liajn fascinajn romanojn kaj novelojn volonte voras plenaĝuloj. Liaj kantoj kaj poemoj estas plezure aŭskultataj kaj aplaŭdataj. Liaj tradukoj fidinde prezentas al legantoj la rusan, ukrainan kaj jidan literaturojn.

La ĉijaraj VK-anoj povas renkontiĝi kun Mikaelo Bronŝtejn lunde la 19-an de julio dum lia Aŭtora momento je la 16.30 (UTC).




Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# 2-a Tago de Azio kaj Oceanio (protokolo)

Tempo: 07:00-09:30 UTC (16:00-18:30, Tokia Tempo)
18 julio, 2021, dimanĉe

Per: Zoom+Jutuba elsendo, aparte aranĝita de KAOEM

Nombro de partoprenantoj:
100(limigite)+Joutube-elsendo (6)

Prezidis: Atusi Nisinaga (Prez. de KAOEM)



**4:00-4:05** Malfermo. Bonvenigo
**4:06-4:10** Saluto de So Jinsu, estrarano de UEA
**4:11-5:20** (po 7 min.) Landaj raportoj
**4: 20-4:27** Japanio : Kitagawa Ikuko
**4:28-4:35** Vjetnamio : Nguyễn Thị Phương Mai
**4:36-4:44** Koreio Oh Soonmo
**4:45-4:52** Indonezio Ilia Dewi
**4:53-5:02** Mongolio Chimedtseren Enkhee

**Inter-paŭzo per kantoj:**
**1e 5:00-5:05** Virtuala Koruso el Koreio, "Al Z"
**2e 5:06-5:14** Vjetnama popolkanto en la vjetnama

**5:15-5:30** Ĉinio: Chen Ji pri ĈEL / Gao Shuyuan pri ĈJEA




**5:33-5:40** Barato: Giridhar Rao
**5:41-5:45** Irano: Ahmad
**5: 46-5:51** Novzeladno: Bradley McDonald
**5:53-6:00** Junulara Agado: Albert Stalin Tancinco Garrido
**6:00-6:10** So Jinsu, prezento pri Esperanto-movado en Azio kaj Oceanio, kaj pri la 10-a Azia-Oceania Kongreso, okazonta oktobre 2022, en Busano, Koreio
**6:11-6:15** Finalo kun kanto: llia Dewi
**6:16-6:30** Post-babilado




**KAOEM:**

1. Estraro kunvenis ĉiun duan semajnon inter julio 2019 kaj januaro 2021, kaj nun kunvenas unu fojon monate.

2. 14 landaj membroj havas "Renkontigon" ĉiun 3-an monaton ekde junio 2020, kaj reprezentantoj prezentas laŭ la temo.

3. Japanio kaj Koreio havis 100-jaran ceremonion de siaj asocioj kaj ambaŭ landoj eldonis librojn de la historio. Ĉinio havos kunvenon "100 jaroj: Esperanto kaj Ĉinio" en la 2-a VK.



4. Junulara agado estas vigla. Junuloj de Azio kaj Oceanio kunvenas regule per Discord.

Notindaj estas brilaj movadoj per lernado, elsendo, kunveno kaj lingva kliniko sur sociaj retsistemoj, ekzemple fejsbuko, instagramo, TikTok. Junuloj kunlaboras harmonie kun landaj asocioj kaj KAOEM, kaj influas al eksjunuloj, dumvivaj junuloj pri sia kulturo, kiel ekzemple gufujo.

5. Tradicia Komuna Seminario inter korea, japana, ĉina, vjetnama junularoj celebros 40-jariĝon en 2022. Ĝi ekfunkciis en 1982 inter korea kaj japana junularoj. (Komencaj aktivuloj estas So Jinsu, estrarano de UEA kaj prezidanto de KEA, kaj Kitagawa Ikuko, prezidanto de JEI). Poste partoprenis ĉina kaj vjetnama junularoj.

6. Universitataj lecionoj estas liverataj en Ĉinio, Barato, Koreio, Japanio k.a.

Spektu ĉe: https://mallonge.net/fo